

Louis FRÉCHETTE

# Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado



Kun la originalaj ilustraĵoj de  
Frederick Simpson COBURN

ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA

ISBN 978-2-9806246-4-3

Ĉefaj verkoj de  
Louis FRÉCHETTE  
(1839–1908)

1862 FÉLIX POUTRÉ	Felikso Poutré [historia dramoj]
1863 MES LOISIRS	Miaj distraĵoj [poemoj]
1866–1869 LA VOIX D'UN EXILÉ	La voĉo de ekzilito [poemoj]
1872 LES LETTRES À BASILE	La leteroj al Bazilo [polemikaj artikoloj]
1877 PÊLE-MÊLE; FANTAISIES ET SOUVENIRS POÉTIQUES	Senorde; poeziaj fantazioj kaj rememoroj
1879 LES FLEURS BORÉALES kaj LES OISEAUX DE NEIGE	La nordaj floroj kaj La neĝbirdoj [poemoj]
1880 LE RETOUR DE L'EXILÉ	La reveno de la ekzilito [dramo]
1880 PAPINEAU	Papineau [historia dramoj]
1881 PETITE HISTOIRE DES ROIS DE FRANCE	Mallonga historio de la reĝoj de Francujo [historio]
1887 LA LÉGENDE D'UN PEUPLE	La legendo de popolo [epika poemo]
1891 FEUILLES VOLANTES	Lozaj folioj [poemoj]
1892–1893 ORIGINAUX ET DÉTRAQUÉS	Originaluloj kaj frenezuloj [rakontoj]
1893 À PROPOS D'ÉDUCATION	Pri edukado [polemikaj artikoloj]
1899 CHRISTMAS IN FRENCH CANADA	Kristnasko en franca Kanado [rakontoj anglalingvaj]
1900 LA NOËL AU CANADA; CONTES ET RÉCITS	Kristnasko en Kanado; fabeloj kaj rakontoj [franclingvaj]
1903 VERONICA	Veroniko [versteatraĵo]
1908 POÉSIES CHOISIES	Elektitaj poemoj
1961 MÉMOIRES INTIMES	Intimaj memoraĵoj

**Kristnaskaj rakontoj  
el franca Kanado**



*"Jen bona vent'! jen bela vent'!"*

A decorative Art Nouveau border with flowing, organic lines and floral motifs, framing the text.

LOUIS FRÉCHETTE

**Kristnaskaj  
rakontoj  
el franca Kanado**

kun la originalaj ilustraĵoj de  
Frederick Simpson COBURN

Dua, reviziita Esperanta eldono  
Traduko de Vincent BEAUPRÉ  
kaj Francisko LORRAIN

ESPERANTO-SOCIETO  
KEBEKIA

2013

Anglalingva originalo: *Christmas in French Canada* [Kristnasko en franca Kanado], Toronto, George N. Morang, 1899

Franclingva originalo: *La Noël au Canada; contes et récits* [Kristnasko en Kanado; fabeloj kaj rakontoj], Toronto, George N. Morang, 1900

Unua Esperanta eldono: traduko de Vincent BEAUPRÉ (Kebeko, Kebekio, Kanado, 1914–1984), multobligita tajpile-karbopapere kaj multobligmaŝine de Paul DURETTE en Saint-Sulpice, Kebekio, Kanado, 1972

Dua Esperanta eldono: traduko de Vincent BEAUPRÉ kaj Francisko LORRAIN (Montrealo, Kebekio, Kanado, 1945–), Esperanto-Societo Kebekia, 2013

Kopirajto de la 1a Esperanta eldono: © Vincent BEAUPRÉ, 1972

Kopirajto de la 2a Esperanta eldono: © Société québécoise d'espéranto [Esperanto-Societo Kebekia], 2013 — ISBN 978–2–9806246–3–6 (por la papera versio [version imprimée])

---

Dépôt légal – Bibliothèque et Archives nationales du Québec, 2014

Dépôt légal – Bibliothèque et Archives Canada, 2014

Laŭleĝa depono – Naciaj biblioteko kaj arkivoj de Kebekio, 2014

Laŭleĝa depono – Biblioteko kaj arkivoj de Kanado, 2014

ISBN 978–2–9806246–4–3

(versions numériques PDF et EPUB3)

(ciferecaj versioj en la formatoj PDF kaj EPUB3)

*La verdaj linioj en la enhavtabeloj estas alklakeblaj ligoj.*

Dediĉo de la anglalingva eldono

*Al*  
*Miaj Tri Bonegaj Amikoj kaj Fratoj-Poetoj*

George MURRAY  
William MCLENNAN kaj  
William Henry DRUMMOND

*ĉi tiu unua anglalingva libro mia estas kore*  
*kaj danke dediĉita*

L. F.

Dediĉo de la franclingva eldono

*Al miaj Infanoj,*  
*kiuj tro rapide kreskis.*

LA AŬTORO

---

*Pri la ilustraĵoj*

Ĉiuj ilustraĵoj, sur kaj en ĉi libro, krom tiuj de la notico kaj la mapoj, estas verkoj de

Frederick Simpson COBURN  
(Melbourne, Kebekio, Kanado, 1871–1960),

ciferigitaj ĉefe el la angla eldono de 1899, sed foje el la franca eldono de 1900. La ciferigadon prizorgis la

Biblioteko de maloftaj libroj kaj specialaj kolektoj,  
Universitato de Montrealo,  
Bibliothèque des livres rares et collections spéciales,  
Université de Montréal,

el siaj plej bone konservitaj ekzempleroj de tiuj originalaj eldonoj.





## Enhavo

Antaŭparolo de la aŭtoro por la anglalingva eldono de 1899 .....	11
Averto de la eldonistoj de la franca eldono de 1900 .....	15
Antaŭparolo de Vincent BEAUPRÉ .....	17
Antaŭparolo por la dua Esperanta eldono .....	19
Notico pri la dua Esperanta eldono .....	21
Ĉe la sojlo .....	29
En neĝostormo .....	43
La fantomkapo .....	57
Tom Karibu' .....	79
Anĝelet' .....	95
La luphomo .....	109
Prononcindikoj por la neesperantaj vortoj en la teksto .....	125
Indekso de Esperantaj geografiaj nomoj .....	127





## Ilustraĵoj

“Jen bona vent’! jen bela vent’!” .....	4
Ni pasigis niajn tagojn senĉese antaŭenirante .....	36
Mi premis la malsensivan lignon... kaj ekploregis .....	39
Ni iom malfrue atingis Sanktan-Joakimon .....	47
Ĉiuj strofoj kaj rekantoj de Petro estis trakantitaj .....	54
Metio ja malfacila .....	59
Maljuna Baron .....	64
Ĉe maljuna Vien .....	65
Post tio, la ursinon ni devis treni ĝis la barako .....	89
Tom Karibu’ komencis malsupreniri la arbon .....	91
Simila al fritpastaĵo ĵus eltirita el la kaserolo .....	97
“Ĉiun Antaŭkristnaskan Vesperon, ĉiam okazas agrabla dancvespero” .....	100
“Post Baptopinto, Dio nenie ĉeestas” .....	103
Joakimo Crête posedis muelejon .....	113
“Vidu, Joakimo, se ci deziras sidlokon en mia glitveturilo, estas unu por ci” .....	117
Kaj li falis surgenuen .....	121



## Notico pri la dua Esperanta eldono

**L**ouis FRÉCHETTE [lui freŝet] (1839–1908) estas unu el la gravaj franckanadaj verkistoj de la 19a jarcento. Li studis juron, sed poste aktivis ĉefe kiel ĵurnalisto kaj verkisto. Li estis, laŭ la tiamaj normoj, sufiĉe progresema homo. El liaj rakontoj oni povas konkludi, ke li estis ja sincere religia homo, katoliko, kiel la plejparto el liaj franckanadaj samtempuloj, sed li estis akre kritikata, eĉ persekutata de la plej konservativaj inter ili, tial ke, interalie, li subtenis respublikismon kontraŭ monarkismo.<sup>1</sup> Krom siaj multnombraj gazet-artikoloj, li multe publikigis, en diversaj ĝenroj: ĉefe poezion, sed ankaŭ teatraĵojn, rakontojn k.a. Listo de liaj plej gravaj libroj kuŝas komence de ĉi tiu libro.



*Louis FRÉCHETTE*  
1839–1908

Li verkis du versiojn de sia kristnaska rakontaro. La unuan, titolitan *Christmas in French Canada* [Kristnasko en franca

---

1. Kanado tiam, kiel nun, estis konstitucia monarkio laŭ la brita modelo, estrata, formale, de la brita reĝo aŭ reĝino.

Kanado] (1899),<sup>2</sup> li aperigis en la angla, ne en sia gepatra franca, ĉar, kiel li mem klarigis en sia antaŭparolo (vd. ĉi-supren), li deziris konigi al la ĉirkaŭanta anglalingva mondo la apartan kulturon de franca Kanado. Tiu anglalingva rakontaro multe disvastiĝis.

Mallonge poste, en 1900, li publikigis francan version de la samaj rakontoj, sub la titolo *La Noël au Canada; contes et récits* [Kristnasko en Kanado; fabeloj kaj rakontoj].<sup>3</sup> Ial, tamen, la verko ne sukcesis konkeri la franckanadan publikon.

Ambaŭ libroj entenas la samajn dek du rakontojn. Iujn li verkis originale en la angla, aliajn en la franca. Kvankam li mem skribis ambaŭ librojn, la du versioj de iu sama rakonto, tamen, ne estas rektaj tradukoj unu de la alia: multajn frazojn, eĉ tutajn alineojn, li libere reverkis.

Sed estas kroma, granda diferenco inter ambaŭ versioj. La angla versio uzas normalan skriban lingvaĵon, kun kelkaj francaj vortoj ie kaj tie. Sed, en liaj franclingvaj rakontoj, la needukitaj personoj parolas en tipa tiama popola lingvaĵo, malfacilege tradukebla pro la multaj aliformitaj vortoj kaj ĉiuspecaj pitoreskaj esprimoj, foje malfacile kompreneblaj de hodiaŭaj franclingvanoj, eĉ el Kanado.

Verŝajne antaŭ 1972, Vincent BEAUPRÉ, kebekia esperantisto, elektis el la dek du rakontoj de tiu libro de Fréchette la ses plej indajn je esperantigo kaj tradukis ilin. Li tion faris ne el la franca eldono, sed el la unua, anglalingva rakontaro — taŭga elekto pro la aparta celo de ĉi-lastaj: konigi aspektojn de la frankanada kulturo al anoj de aliaj popoloj.

Mi funde reviziis la Beupré-an tradukon, fakte pli-malpli referante ĝin, plibonigante ĝian lingvaĵon, kaj samtempe pli-proksimigante ĝin tiom, kiom mi povis, al la sufiĉe bunta

---

2. Ciferigo de tiu anglalingva eldono elŝuteblas el la paĝaro archive.org: [alklaku ĉi tiun ligon](#).

3. Ciferigo de tiu franclingva eldono elŝuteblas el la sama paĝaro: [alklaku ĉi tiun ligon](#).

literatura stilo de Fréchet. En traduko de bona aŭtoro, fidelo gravas. Fréchet estis antaŭ ĉio poeto. Mi klopodis ne nur respuguli liajn apartajn vortelektojn kaj esprimmanierojn, sed ankaŭ redoni la 19a-jarcentan etoson de lia prozo, respektante ekzemple liajn alineojn kaj, laŭeble, liajn majuskligojn kaj interpunkcion. Mi esperas, ke mi sukcesis almenaŭ iomete alproksimiĝi al mia celo.



*Vincent BEAUPRÉ 1914–1984*

Kiel Beaupré, mi ĉiam eliris el la anglalingva teksto de Fréchet, malgraŭ ke lia angla, ĝenerale bona, foje tamen ne estas tute senripoĉa — kion cetere li mem agnoskis. Sed mi ofte konsultis la franclingvan tekston, ĉu por klarigi ion al mi ne tute kompreneblan, ĉu por elekti inter du eblaj sencoj.

La franca versio krome instigis min uzi en ĉi tiu Esperanta traduko la pronomon *ci* ĉie, kie en la franca teksto la aŭtoro uzas la francan ununombran duapersonan pronomon *tu*.

Omaĝe al Vincent BEAUPRÉ, nepras ĉi tie doni kelkajn bazajn informojn pri li. Li naskiĝis en 1914 kaj mortis en 1984. Li loĝis en la urbo Kebeko. Jen elĉerpaĵo el la vikipedia artikolo pri li:<sup>4</sup>

[...] Li esperantistiĝis en 1960 kaj partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto en 1967. Kun granda entuziasmo li revenis al sia urbo, Kebeko, kaj fondis la Kebekan Esperanto-Klubon. Li estis ties prezidanto en 1965, kiam, laŭ lia mesaĝo en la kluba gazeto *L' Alvoko*, ĝi atingis “102 aktivajn membrojn”.

---

4. Alklaku jenan ligan: [Ĝermolisto de kanadaj esperantistoj](#).

## *Kristnaskaj rakontoj*

De la jaro 1968 kaj dum la 70aj jaroj, li estis estrarano de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) kaj ofte, spite al la distancoj, vojaĝis al la estraraj kunsidoj. Li kompreneble partoprenis en kelkaj kongresoj de KEA. Malgraŭ malbona sanstato li ĉeestis la fondiĝon de la Esperanto-Societo Kebekia en septembro 1982.

La traduko de Beaupré neniam estis presita, sed nur multobligita, malgraŭ ke fotokopiado estis tiam jam disvastiĝinta. Tiurilate ni substreku la laboron de frato Paul Durette, F. C.<sup>5</sup> (1900–1972), sindona kebekia esperantisto, kiu multe instruis Esperanton kaj kiu, parte tajpmaŝine-karbpapere, parte multobligmaŝine, multobligis la tradukon de Beaupré, verŝajne dum sia lasta vivojaro, 1972. Durette ankaŭ mem tradukis kelkajn rakontojn de diversaj franckanadaj (krom unu anglakanada) aŭtoroj, kaj same multobligis ilin, samjare. Al tiuj rakontoj li aldonis unu originale verkitan en Esperanto de li mem.<sup>6</sup>



*Paul DURETTE*  
1900–1972

Gravegas omaĝi ankaŭ al Frederick Simpson COBURN (1871–1960), kiu elstare ilustris tiun rakonton de Fréchette. Coburn estis grava kanada pentristo. Naskiĝinte en Melbourne, urbeto ne malproksima de Montrealo, li studis pentrarton unue en ĉi-lasta urbo, kaj poste en Nov-Jorko, Berlino, Parizo, Londono, Hago kaj Antverpeno. Li ilustris multegajn librojn krom ĉi tiu de Fréchette. Li famiĝis tamen ĉefe pro siaj pentraĵoj de vintraj scenoj kaj ĉieloj, en kiuj oftege rolas ĉevaloj, majstre prezentitaj. Dum sia vivo li multe vojaĝis, kaj

---

5. F. C.: Frato de la Karitato.

6. Paul DURETTE, *Kanadaj rakontoj*, Unua kajero, Saint-Sulpice (Québec), 1972, 66 paĝoj. Vizitu la retpaĝon [durette.chez.com](http://durette.chez.com), kiu enhavas kelkajn informojn pri li, bedaŭrinde malmultajn.

parolis kvin lingvojn. Lia pranevino, Teresa COBURN, skribis al mi:

mi certas, ke plaĉus al li scii pri la streboj de via organizaĵo konigi nian literaturon kaj arton al pli vasta publiko.<sup>7, 8</sup>

Ĉiuj ilustraĵoj kaj desegnoj en ĉi tiu libro, krom tiuj de la notico kaj la mapoj, estas verkoj de Coburn, ciferigitaj el la unua angla kaj unua franca eldonoj de la libro.

## **Dankoj**

Dankojn mi ŝuldas al multaj homoj, diversmaniere helpintaj min:

- al s-ino Teresa COBURN pro ŝiaj afablaj leteroj, interalie responde al informpeto mia pri la rajtoj rilataj al la ilustraĵoj de la Fréchette-a rakontaro,
- al Trefflé (Trefleo) MERCIER kaj Ken PRICE pro diversaj informoj pri Vincent BEAUPRÉ,
- al Catherine BERNIER, bibliotekisto pri literaturo kaj kinarto en la Literatura kaj Homscienca Biblioteko de la Universitato de Montrealo, pro informoj pri aŭtoraj rajtoj,
- al Normand TRUDEL, bibliotekisto pri maloftaj libroj kaj specialaj kolektoj, same en la Literatura kaj Homscienca Biblioteko de la Universitato de Montrealo, pro efika kunlaboro pri la ciferigado de la ilustraĵoj,

---

7. “Since F. S. Coburn spoke five languages himself, I am sure he would be pleased to know of your organization’s efforts to make our literature and art available to a wider audience.” Teresa COBURN, letero, 2008.2.11.

8. Oni trovos pliajn informojn pri Coburn, anglalingvaj kaj francilingvaj, en la interreto, interalie en la retejo [fscoburn.com](http://fscoburn.com).

## *Kristnaskaj rakontoj*

- al Marcelle BERTRAND, samloka komizino, pro ŝia ĉiam afabla akcepto kaj helpo,
- al Jacques DES ROCHERS, konservisto pri kanada arto, Montreala Muzeo pri Belartoj, pro lia helpo trovi la heredantojn de Coburn,
- al André LECLERC el la Kebekia Asocio de Damludantoj pro liaj klarigoj pri la damludo (rilate la rakonton “La lup-homo”),
- al Normano LEGAULT, kiu konigis al mi la kuriozan fenomenon de la glacia konuso piede de la akvofalo Montmorency (vd. la rakonton “La fantomkapo”).

Mi danku fine tiujn, kiuj rekte kontribuis al la pretigado de ĉi tiu eldono:

- la unuan enkomputiligon de la teksto faris Zdravka METZ (Montrealo, Kebekio, Kanado),
- la grafikon — kaj interalie la mapojn, ofte el 19a-jarcentaj donitaĵoj — profesiege faris François GIRARD (Montrealo, Kebekio, Kanado),
- reviziis Bruce CRISP (Otavo, Ontario, Kanado), Trefflé (Trefleo) MERCIER (Ŝerbruko, Kebekio, Kanado) kaj Giorgio DENTI (Romo, Italujo).

Sen ili ĉiuj, tiu ĉi libro eĉ ne estus aperinta.

## PRI PROPRAJ NOMOJ

Ion mi diru pri la propraj nomoj en ĉi traduko. La franca originalo kompreneble enhavas multajn francajn proprajn nomojn, ĉu de homoj, ĉu de geografiaj lokoj. En sia angla versio, Fréchette povis rekte uzi tiujn francajn proprajn nomojn, ĉar ili estas nenio eksterordinara por anglalingvanoj, kaj tiel tiu angla versio akiras iom francecan etoson.



Sed en Esperanto estas malsame: multaj legantoj ne scipovas la francan, nek kutimas al francaj vortoj. Krome la prononco, eĉ proksimuma, de franca vorto ofte malfacile diveneblas, se oni ne konas la lingvon (same estas por la angla, cetere). Mi decidis esperantigi ĉiujn antaŭnomojn kaj multajn loknomojn, por ke la legantoj

1. pli facile prononcu ilin,
2. pli facile komprenu ilin, sen la interveno de piednotoj (ekzemple, multaj ne scius, ke “Pierre” estas la ekvivalento de “Petro”, “Saint”/“Sainte” de “Sankta”, ktp),

kaj tiel pli facile eniru la rakontojn kaj ĝuu ilin.

Tamen ĝenerale la francajn vortojn malfacile tradukeblajn (familinomojn, iujn loknomojn aŭ partajn loknomojn) mi ne klopodis iel-tiel, duone malbone esperantigi, kaj lasis ilin en la franca, nur indikante ilian prononcon en apendico. Restas en la rakontoj verdire pluraj francaj vortoj, kiuj kreas ja iom francecan etoson.

#### PRI LA PIEDNOTOJ

Iujn piednotojn enmetis Fréchettes mem en sian tekston: al ĉiuj tiuj notoj mi donis la titolon *Noto de la aŭtoro*. Ĉiuj aliaj piednotoj estas notoj de la tradukintoj kaj finiĝas per iliaj inicialoj, VB aŭ FL.

Francisko LORRAIN





## ĈE LA SOJLO




**N**I estis survoje de Montrealo al Kebeko, kaj en la grupeto, kuniĝinta sur la ferdeko de la vaporŝipo, ekis dum la vespero diskuto ĉefe pri literaturaj temoj.

Kompreneble kelkaj el ni (pesimistoj konvinkitaj aŭ pretendaj) nepre asertis, ke nia moderna progreso, elmontrata en komerco, praktika scienco kaj industrio, funde malamikas al ĉio ideala. Laŭ ili, vaporo, elektro kaj, antaŭ ĉio, la spirito de Komercismo mortigis Poezion: la Eiffel-turo estas ĝia maŭzoleo.<sup>1</sup>

La interŝanĝo estis altirinta kelkajn spektantojn. “Pardonu min,” interrompis unu el ili, senceremonie enmiksiĝante en la diskuton, laŭ la facilanima kutimo de vojaĝantoj. “Pardonu min,

---

1. Tiu turo konstruiĝis en 1889. FL



sed tio, kion vi diras, estas rekta herezo. Poezio neniam mortos, dum batados koro en homa brusto. La idealo sidas en ni mem, ne en la ekstera mondo. Tio, kio ĝenerale ŝajnas plej banala objekto, povas, laŭ la cirkonstancoj, ekmontriĝi interesplena, aŭ krei impreson similan al tiu de la plej alta lirika aŭ sentoveka poezio. Ĉio dependas de la mensostato kaj, super ĉio, de la vidpunkto de la spektanto.

“Jen ekzemplo el mia propra sperto: tio plej poezia, kion mi iam ajn vidis en mia vivo, kio plej tuŝis mian animon, vekante en ĝi la plej intensan kaj profundan senton, estis io tiel ege banala, ke neniu inter vi, mi certas, iam imagus, ke ĝi povus elvoki la plej malgrandan emocion. Ĝi estis nenio pli ol simpla telegrafofosto.”

“Telegrafofosto? Ho, nu!”

“Jes ja, sinjoroj; mi ne ŝercas. Permesu al mi rakonti la aferon, kaj vi juĝos.”

La rakontanto estis franckanadano, forta kaj vigla, kvankam ja pli ol sesdekjara, kun vizaĝo energia, okulo akra, voĉo belsona kaj akĉento de kulturita homo.

Ni insiste petis lin rakonti sian historion, kaj senprokraste li komencis:

Sinjoroj, mi pasigis dudek du jarojn el tio, kion mi povas nomi mia juneco, en tiam malmulte konata regiono, poste vaste ekfamigonta — Klondajko.<sup>2</sup>

Neniu tiam eĉ revis prifosi tiun frostan grundon, serĉante orŝtonetojn aŭ flavan sablon. La sola tiama industrio tiuregione estis la peltokomerco. La sovaĝejaj trezoroj, kiujn ni serĉis, ne akireblis per pioĉoj aŭ kribriiloj, sed per kaptiloj kaj fusiloj, ĉu per niaj propraj manoj, ĉu per tiuj de la indiĝenoj, kiuj vizitadis niajn interŝanĝejojn.<sup>3</sup>

Mi ne menciis la cirkonstancojn, kiuj kondukis min tien, se ili ne estus la ĉefa kaŭzo de la spiritstato, en kiu mi estis, tempe de la rakontota okazaĵo. Jen ili en kelkaj vortoj.

Mi naskiĝis en Ouelle-Rivero.<sup>4</sup> Mia patro mortis, dum mi ankoraŭ studis en kolegio, kaj mia patrino reedziniĝis ĉirkaŭ du jarojn poste.

Kiam mi finis ĉe la kolegio, mia patrino forte deziris, ke mi eniru unu el la liberalaj profesioj,<sup>5</sup> kio sufiĉe plaĉis al mi; sed, por ke tio realiĝu, mia familio devus iom ŝpari, kion mia duonpatro, kun kiu mi havis malmulton komunan, obstine rifuzis. El tio rezultis diskutoj, miskomprenoj kaj konfliktoj; resume, la vivo fariĝis neeltenebla kaj por mia patrino kaj por mi.

---

2. *Klondike*: nord-okcidenta regiono de Kanado, en kiu fluas samnoma rivero, enfluanta en la riveregon Jukono ĉe Dawson-Urbo. Tien, ekde 1897, amase iris homoj, serĉante oron. VB, FL

3. Temas pri lokoj, en kiuj la indiĝenoj alportadis peltojn, kiujn ili interŝanĝis kontraŭ aliaj varoj kun tieaj blankuloj. FL

4. *Rivière-Ouelle*: vilaĝo en Kebekio, borde de Sankta-Laŭrenco, alviale de Kebeko. FL

5. T.e., ke li fariĝu advokato, notario, kuracisto aŭ simile. FL

## Kristnaskaj rakontoj



Kompatinda patrino! ŝi suferadis pro mia ĉeesto; ŝi estis ploronta pro mia foresto.

Ĝuste ĉar mi tiel tenere amis ŝin, mi ne kapablis toleri la penson, ke mi estas por ŝi kaŭzo de tiom da maltrankvilo. La sola solvo estis, ke mi tuj foriru, por ĉiam, kaj mi profitis la unuan oportunun tion fari.

La Hudson-golfa Kompanio<sup>6</sup> ofertis al mi laboron. Mi do forlasis mian hejmon, kaj ekvojaĝis direkte al la Nord-Okcidento kaj la foraj limoj de Alasko, kun grupo da aventuremaj junuloj kiel mi.

Mi ne parolos pri miaj vagadoj, nek pri mia vivo en la diversaj interŝanĝejoj, kie mi deĵoris. Ha! mi garantias al vi, ke iu ajn el tiuj, kiuj opinias la modernan civilizacion tro vulgara, trovus tie

---

6. *Hudson's Bay Company*: kompanio tiam reganta la peltokomercon. VB, FL

plenan oportunun modifi sian opinion, ke prasovaĝeco estas prapoezio.

Ja ne mankis necesajoj; sed pri tiuj mil unu luksaĵoj, tiuj bagatelaj rafinaĵoj, kiuj dolĉigas la vivon, ne eblis eĉ revii. Laboro abundis, de la plej pena, plej elĉerpa speco. Sed nur en specifaj sezonoj. Kaj kiel pasigi la tempon dum la alia parto de la jaro? Estis malmultegaj libroj. Kion ni povis elpensi por kontraŭi la teruran enuon de la rigora kaj senfina vintro, ĉiam vidalvide al la samaj kunuloj, kaj povante nombri la tagojn nur per la mallonga apero de la suno apud la horizonto?

Neniu novaĵo el mia hejmo! Fortranĉita de la ekstera mondo dum dek du longaj monatoj ĉiun jaron! La poŝto alvenis nur unu fojon ĉiujare, dumsomere, kaj tio estis ĉio. Imagu dudek du jarojn de tia vivo!

Fine, aŭtune de 1876, la malfruanta poŝto alportis al mi du novaĵojn, kiuj multe proksimigis min al miaj antaŭaj vivo kaj lando. La unua novaĵo estis, ke mia duonpatro mortis, kaj ke mia kompatinda patrino, nun maljuna kaj kripla, vivis nur per la espero de mia reveno. La alia novaĵo estis, ke la nove konstruita Kanada-Pacifika Fervojo<sup>7</sup> ĵus atingis Kalgarian, el kie ĝi devis transsalti la Rokan Montaron.

Tiam mi estis en Fuorto Jukono,<sup>8</sup> ĉe la riverego Jukono, 300 mejlojn<sup>9</sup> nord-okcidente de Fuorto Fidindo, nun famiĝinta kiel Dawson-Urbo.<sup>10</sup> Mi estis libera foriri. Siua indiano,<sup>11</sup> kiu konis la landon kaj estis reiranta al Edmontono, povis gvidi min;

---

7. *Canadian Pacific Railway*. Ĝi konstruiĝis iom post iom, de oriento okcidenten. FL

8. *Fort Yukon* (Alasko). En ĉi tiu libro, la angla-franca vorto *fort* estas ĉiam tradukita per “fuorto”. FL

9. 1 mejlo  $\approx$  1,6 km. VB, FL

10. Fuorto Fidindo: *Fort Reliance* (Jukonio). Dawson-Urbo: *Dawson City* (Jukonio). Fakte Fuorto Fidindo situas 13 kilometrojn alvane de Dawson, ĉe la riverego Jukono. FL

11. La siuoj estas nord-amerika indiĝena popolo. VB, FL

kun koro bateganta pro senpacienco mi haste preparis min por la ekvojaĝo.

Kaj tiel la mateno de la unua de novembro vidis min kun mia indiano, ambaŭ sur neĝoŝuoj, vojiri sur la frostiĝinta rivero Histriko,<sup>12</sup> almonten. Unu iris antaŭ kaj la alia malantaŭ longa sledo ŝarĝita per provizoj kaj pakajaĵo, trenata de kvar fortikaj eskimaj hundoj. Ni estis survoje al Fuorto Lapierre,<sup>13</sup> ĉirkaŭ 250 mejlojn oriente.

De Fuorto Lapierre, ni devis atingi Fuorton McPherson, transirante la Rokan Montaron sepdek mejlojn, tra pena labirinto de torentoj, krutegaĵoj, minacaj rokoj, glaĉeroj kaj kapturnaj montopintoj. Jen sovaĝa poezio! Sed mi povas certigi vin, ke oni tre dankemis al la Providenco, kiam la poezio fariĝis malpli superrega kaj malaltiĝis al komforta kaj malpli danĝera prozo.

Forlasinte Fuorton McPherson, ni devis laŭiri la riveron Peel proksimume 100 mejlojn, post kio alia mejlocento, tra herbejoj, riveretoj kaj portadejoj,<sup>14</sup> kondukis nin ĝis Fuorto Bona Espero ĉe la riverego Mackenzie, laŭ kiu ni almontis ĝis la Granda Slavea Lago<sup>15</sup> — 600-mejla vojiro tiufoje.

Ekde la Granda Slavea Lago nia vojo fariĝis rekta linio trans la herbejego ĝis Athabaska-Haltejo,<sup>16</sup> nia lasta etapo antaŭ ol

---

12. *Porcupine*. Tiu rivero enfluas en la riveregon Jukono ĉe Fuorto Jukono. FL

13. La ĝusta nomo de tiu loko, almenaŭ hodiaŭ, ŝajnas esti *Lapierre House* (Nord-Okcidentaj Teritorioj). FL

14. Portadejo estas vojeto laŭiranta nenavigeblan parton de rivero, laŭ kiu, varmsezone, oni devas surŝultre porti la kanuojn kaj pakajaĵon. Oni uzas la portadejojn eĉ vintre, kiam oni vojaĝas piede, kaj la riveron kovras glacio, ĉar ties surfaco, pro la multaj rokoj en ĝi en tiuj lokoj, estas ege malglata. FL

15. *Great Slave Lake / Grand lac des Esclaves*, laŭvorte “la granda lago de sklavoĵ” — sed fakte ne temas pri sklavoĵ, sed pri la slaveoj (angle *slaves* aŭ *slaveys*), tiea indiana popolo. FL

16. *Athabasca Landing*, hodiaŭ *Athabasca* (Alberto). *Landing* estas riverborda haltejo. FL




## Ĉe la sojlo



atingi Edmontonon — plua marŝado de almenaŭ 500 mejloj. Tio ne estis plezura ekskurso, nek facilanime entrepreninda vojaĝo, kiel vi vidas! Sed eĉ pli longajn kaj penajn etapojn oni povas elteni malpezkore, kiam amatoj atendas ĉe la celo.

Ni pasigis niajn tagojn senĉese antaŭenirante, paŭzante nur por tagmanĝi. Vespere ni bivakis ie ajn, kie estis sufiĉe da ligno

por nia fajro. Nia bivakado reduktiĝis al simplega ceremonio. Unue, antaŭ ĉio, la hundoj estis maljungitaj kaj ricevis sian porcion da frostigita fiŝo — ilin oni devas bonege prizorgi, ĉar en tia vojaĝo ili konsistigas onian plej altvaloran posedaĵon; post tio, sur bona fajro, ni boligis nian kaldronon.



*Ni pasigis niajn tagojn senĉese antaŭenirante*

Jes, ni vespermanĝis en libera aero, ŝirmataj de io ajn, kaj ofte de nenio, vipataj de la vento kaj neĝblovado. Post la vespermanĝo, ni devis sekigi niajn peltvestojn, humidigitajn pro niaj tuttagaj klopodoj; post tio ni fumis, kaj finfine sterniĝis sur la neĝo, inter ursofelo kaj kovrilo plektita el leporfeloj, kun niaj pafiloj tuj apude — kaj bonan nokton, kamarado!

Krom kiam ni haltis ĉe diversaj fuortoĵoj kaj interŝanĝejoj, kie ni pasigis unu tutan tagon en ripozo ja meritita, sed ankaŭ tre bezonata, ni do ĉiunokte dormis sub la steloj — ĝis la dudekkvara de decembro, kiam, laŭ nia takso, ni devis atingi Athabaska-Haltejon fruposttagmeze.

Mi estis improvizinta kalendareton el ostoj, en formo de huf-fero, en kiu lignokejletoj indikis la daton de la monato kaj tagon de la semajno. Tiel mi povis facile sekvi la pason de la tempo, kaj,

spite malvarmon kaj lacon, min ĝojigis kaj kuraĝigis la penso, ke mi trapasos la sanktan Antaŭkristnaskan Vesperon — plej karan el ĉiuj familiaj festoj — en kompanio de miaj similuloj, sub kristana tegmento.

Malfeliĉe, tiu fervora deziro mia estis destinita ne plenumiĝi. Ekde frua mateno falegis neĝo, pelata de forta nord-orienta vento, pro kio ni nur malrapide kaj malfacile kapablis antaŭeniri. Tagmeze ni troviĝis en la centro de neimagebla ŝtormo, malbliganta al ni vidi eĉ dek paŝojn antaŭen.

La bonaj loĝantoj de Kebeko opinias, ke ili konas iom pri neĝoŝtormoj. Estus kruele sendi ilin al la plej fora Nord-Okcidento, kie ili konstatus, ke, fakte, eĉ ne iometon ili scias pri ili.

En tiuj malproksimaj regionoj neĝoŝtormo estas nura teruraĵo. Ĝi klakfrapas kaj sufokas, blindigas kaj frostigas. Oni perdas sian piedtenon, stumblas ĉiupaŝe kaj ne plu kapablas spiri; distancojn kaj direktojn ne plu eblas taksi. Nenio plu gvidas; de la suno mem difuziĝas nur malforta lumeto tra la opaka atmosfero. Eĉ la kompasoj fariĝas malfidinda, kaj oni ŝancelpaŝas plu, hazarde, kvazaŭ palpe serĉante sian vojon, rigidiĝinta, anhelanta, duone droninta en la sovaĝaj ekblovegoj kaj furiozo de la ŝtormo.

Se mi ne estus tiel firme dezirinta atingi la fuorton tiutage, ni estus povintaj kaŭriĝi en iu ravino, malantaŭ la protekta ŝultro de iu altaĵo, sub arbusto — ie ajn, kie ni povis lasi la ŝtormon furiozi super niaj kapoj; sed mi obstine restis ĉe mia decido ne tranokti ekstere tiun Antaŭkristnaskan Vesperon, kaj ni plu antaŭenstumblis, malgraŭ tio, ke niaj hundoj ne plu moviĝis sen vipfrapoj sur iliajn dorsojn.

Sed ĉiuj klopodoj niaj estis vanaj; la fuorto ŝajne retiriĝis antaŭ ni, kaj je ekvespero fariĝis klare, ke ni devojiĝis. Ni ne plu dubis pri tio, kiam la neĝo ĉesis, kaj la nuboj sufiĉe disiĝis, por ke ni vidu per la steloj, ke ni direktiĝas tro okcidenten. Atingi la fuorton tiunokte ne eblis; ni devis pri tio rezigni.



Jen ses kristnaskaj rakontoj de Louis FRÉCHETTE [lui freŝet] (1839–1908), unu el la gravaj franckanadaj verkistoj de la 19a jarcento. Li aperigis ilin en 1899–1900, en versioj anglalingva kaj franclingva, ambaŭ de li mem verkitaj, kun la celo konigi la franckanadan kulturon al la ekstera mondo.

Li studis juron, sed poste aktivis ĉefe kiel ĵurnalisto kaj verkisto. Li estis, laŭ la tiamaj normoj, sufiĉe progresema homo. Krom liaj multnombraj gazetartikoloj, li multe publikigis, en diversaj ĝenroj: ĉefe poezion, sed ankaŭ teatraĵojn, rakontojn k.a.